


# La NASKa Fasko

Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe la Universitato William PEACE

sabaton, la 4-an de Julio, 2015 • numero kvin

## Kio okazos hodiaŭ?

★ 8:30 – 12:15 atm  
Lecionoj en Flowe



★ 2:00 – 4:30 ptm  
KTF-filmado

Derek, Karlo kaj Ĵenja daŭrigos la KTF-filmadon dum la posttagmezo. Por tiuj, kiuj ne partoprenos en la filmado, ni prezentos alian eblon:

★ 2:00 – 4:30

Muzeo/festo-ekskurso

**Renkontiĝu en Finley, unua etaĝo**

Hoss gvidos grupon al proksimaj muzeoj en la urbocentro. Venu al la unua etaĝo de *Finley* (nia loĝejo) kaj de tie ni piediros al:

- muzeo de natursciencoj
- muzeo de historio
- la ŝtato-domo de Norda Karolino

La piediro al la urbocentro daŭros ĉirkaŭ 15 minutojn. Vidu la mapon dekstre.

★ 8:15 – 10:30 ptm

Festo-ekskurso al Raleigh

**Renkontiĝu en Finley, unua etaĝo**

En la urbocentro oni festos la tagon de usona sendependiĝo. Tien ni ekskursos por aŭskulti muzikon, manĝi grasajn dolĉaĵojn, kaj amuziĝi. Artfajraĵoj komenciĝos je 9:30, kaj poste ni revenos hejmen.

### La NASKa Fasko

Redaktejo: Finley 112

<nask.esperanto@gmail.com>

La NASKa Fasko estas ĉiutaga ĵurnalo de la kursaro. Trovu ĝin matene en la komuna ĉambro ĉe la unua etaĝo de nia loĝejo.

Se vi volas kontribui mallongan artikolon, foton, ŝercon, bildstrion, leteron, poemon, am-leteron, ktp. bonvolu alporti ĝin al la redaktejo en ĉambro 112, aŭ – eĉ pli bone – sendu ĝin al:

<nask.esperanto@gmail.com>

## Venu por muziko kaj artfajraĵoj!

Hodiaŭ estas la 4-a de Julio, datreveno de la usona sendependiĝo kaj tutlanda feritago kiam oni iras eksteren por ĝui paradojn, ludojn, konkursojn, krad-rostitajn manĝaĵojn, kaj pli.

En la urbocentro de Raleigh okazos pluraj senpagaj eventoj dum la posttagmezo kaj vespero: koncertoj, ludoj, ktp. Homoj ankaŭ konkursos pri manĝado de kolbasoj kaj elsputado de akvomelonaj semoj. (Jes, vere!)

**Je la 2-a ptm** ni iros de nia loĝejo al kelkaj muzeoj ene de kelk-minuta promeno. Vi rajtas eniri la muzeojn senpage, aŭ resti ekstere por ĝui la stratfeston, laŭ via plaĉo. **La muzeo de natursciencoj** havas plurajn ekspoziciojn pri biologio, ekologio, geologio, mar-scienco, ks., kaj specialajn portempajn ekspoziciojn.

La **nordkarolina muzeo de historio** prezentas informon pri la pratempaj indiĝenoj, la alveno de eŭropanoj, la enlanda milito, la luktoj por homaj rajtoj, kaj multe pli. Proksime estas ankaŭ la **ŝtato-domo de Norda Karolino**. La urba registaro prezentos artfajraĵojn je 9:30 ptm. Laŭdire, oni povos almenaŭ parte vidi ilin de la universitata kampuso. Tamen por tiuj, kiuj volas pliproksimiĝi al la festo, **Hoss invitas vin piediri kun li al la urbocentro je 8:15 ptm.**

Ni denove ekiros de la unua etaĝo de nia loĝejo.



## Enigmo-solvoj

Jen almenaŭ kelkaj (sed verŝajne ne ĉiuj) el la radikoj, kiuj kaŝiĝis en la hieraŭa enigmo: ABEL', APARAT', AV', BEL', BEB', BID', CIGN', DIFEKT', DOG', DUM', ENKET', FIZIK', GAP', GLACI', GRAK', HOR', IKS', JUVEL', KAS', KNED', KOM', KOR', LAM' LARD', LUP', MARŜ', MOK', MOT', MUS', MUSK', NASK', ORGANIZ', PAG', PAGOD' PEZ', PIP', POT', PRET', PUL', REFLEKT', RET', ROK', SALT', SEL', SKI', SONOR', SUM', ŜAŬM', TER', TIK', TONDR', TUR', VEND', VENDRED'

# Jenja BONDELID salutas

Jenja BONDELID ĉi-jare instruas la postbazan kurson kaj kune organizas la Kino-Teatro-Festivalon. Spektintoj de la video-kurso Pasporto konas ŝin kiel la skulptiston Helena BONVOLO.



Mi ne povas esprimi kiom mi feliĉas esti inter vi denove por instrui la postbazan nivelon. Ankaŭ pasintjare mi respondecis por la postbaza nivelo, kaj en 2013 en Raleigh mi estis studentinstru-

isto de Liĉjo MILLER en la sama nivelo. Antaŭ multaj jarcentoj, kiam la mondo estis juna, kaj kiam estis drakoj en Eŭropo ktp, dum la epoko de la filmado de *Pasporto al la Tuta Mondo*, mi estis tre ofte studanto ĉe NASK. Ĉiam estas mia ĉefa ĝojo en jaro, havi tiun sperton inter la partoprenantoj ĉe NASK, ĉu kiel studanto, ĉu kiel instruisto, ĉu kiel Festivalskipano.

Estis defie, kiel studanto, fari ĉiujn hejmtaskojn kaj samtempe aperi en la filmon *Pasporto*. Konfesinde, mi eĉ ofte rezignis pri la hejmtasko, por povi bone parkerigi miajn dirajojn por la morgaŭo. Estis efektive kompleta hazardo ke mi akiris la rolon, temis pri portempa malsano ĉe la tiama Helena, Lana SCHLAFER. (Eĉ ŝi ne estis la unua Helena.) La teamo bezonis daŭrigi la filmadon antaŭ ŝia resaniĝo; mi estis samaĝa kiel Lana, kaj do ili kaptis min. Mi ne havis tre multan aktoran sperton tiam, sed mi lernis multon, kaj ĝuis la sperton sufiĉe por ke mi daŭre interesiĝu pri aktorado dum la intervenaj jaroj. Nun havi okazon kunlabori kun Paŭlo GUBBINS denove post tiom multe da

jaroj estas ja ĝojo, kiu espereble daŭros en kunlaboro pri iuj projektoj estontaj.

Duan fojon mi trovas, ke hazardo metas min en rolon neanticipitan. Pro malbona vetero, du aktoroj kiuj jam bonkore akceptis rolojn, Filisa GONZALES kaj Leonora TORRES, ne alvenas sufiĉe frue por aktori en la filmo kiun prilaboros KinoTeatroFestivalo ĉi tie. Ni serĉis la studentaron por anstataŭantoj, parte sukcese. La plenumo de rolo dependas je multaj diversaj faktoroj, kaj malgraŭ la multaj voluntulemaj homoj, kaj eĉ spite pripensojn ĉu ŝanĝi la rolon de virina al vira, ni ne trovis la ĝustan aktoraron por unu el la roloj inter la partoprenantoj. Sed “la spektaklo daŭru” kiel oni diras. Jam tro malfruas reverki scenaron aŭ nuligi la planon, do nia filmreĝisoro Derek ROFF petis min plenumi la rolon.

Mi ja avidis vidi tutan rolantaron de nur studentoj etendi siajn alojn en la projekto, kaj mem havi pli foran alvidon, sed mi povas konfesi ke mi kompreneble ankaŭ feliĉas troviĝi inter la aktoroj.

Kompreneble tio ne forprenu mian fokusigon de miaj studentoj dum la mateno, sed tial oni antaŭpreparas multajn lecionerojn, okaze je neanticipitajoj, kiel okazemas en la filma mondo, la Esperanta samkiel ajna alia. Nia filmo *Daŭra Laboro* ja bonŝancas pro reĝisoro kiel Derek, kiu kalme traktas ĉian koboldon kiu levas sian kapon dum la preparado kaj filmado.

## Ĉu ni pepu?

Haritha MALLADI



Mi pensas ke iuj partoprenantoj en NASK uzas la retservojn Twitter kaj/aŭ Instagram. Do,

mi ŝatus proponi

kradvorton (angle, “hashtag”) por niaj pepoj kaj afiŝoj en tiuj retejoj:

## #EoNASK2015

Se ni ĉiuj uzos ĝin, ni povos facile trovi kaj vidi la pepojn kaj afiŝojn de unu la alia.

Cetere, kiam NASK finiĝos, per la kradvorto oni povos kolekti ĉiujn afiŝojn uzante la servon Storify.

[Tre bona ideo! Eble ni uzu tiun saman kradvorton ankaŭ en aliaj sociaj retoj kiuj utiligas kradvortojn, kiel ekzemple Facebook kaj Google+. Tio nepre helpos min trovi kaj reuzi viajn fotojn por reklami NASK-on venontjare. —Hoss]

## Ambasadoro de Esperanto

Maria MURPHY

Mi estas fiera pri la nomo *Ambasadoro de Esperanto*, kiu aperis en artikolo de mia loka ĵurnalo *Englewood Sun* antaŭ kelkaj monatoj (en Aprilo).

## Englewood Sun

Kiam mi unue ekloĝis en Florido jam en 1984 kune kun mia edzo Ralph ni multe aktivis en la komunumo, kaj aperis dekoj da artikoloj kaj informoj.

Post lia tro frua morto en 1987 mi ne povis lasi tion. Tamen de tempo al tempo mi kaptas ĵurnalistojn kaj artikolojn aperas. Jen elтираĵo:

“Chez Esperanto-Englewood is a home filled with an Esperanto flag (green star on a white background), T-shirts, hats, photos, a framed portrait of Zamenhof and many shelves of books, hundreds of Esperanto books.”



Ne nur infanoj amas pluŝbestojn. Ankaŭ NASK-instruistoj. Dankon al Cassidy pro la bela foto!